

En la betulurbo pri aktualaj evoluvojoj de lernado

La unua nomparto de la venonta konferencurbo de ILEI, Nyíregyháza en Hungario [vd la urban blazonon sube], signifas *betulo* (*Nyír*) kaj ĝi estis unuafoje skribita kiel urbonomo en la jaro 1209. Ĝi simbole asociiĝas kun la konferenca temo:

Novaj vojoj de lernado

Kiel la arbo, kiu plej frue folias post la vintro, la betulo en tradiciaj kulturoj de slavoj kaj keltoj havas simblan signifon de printempo, renoviĝo, kresko kaj adaptiĝemo. La lernado, siaflanke, akompanas unue la printempon de homa vivo, la kreskon de infano en plenaĝulon kaj tutvivan kreskigon de la kapablo adaptiĝi al la vivmedio per la bezonataj scioj kaj lertoj.

Novaj vojoj de lernado en la moderna pedagogio signifas ne nur novajn lernteknologiojn kaj instrumedojn, sed unuavice novan aliron al la lernado kaj instruado kaj ŝanĝitajn rolojn de la lernanto kaj la instruanto en la lernprocezo. Estas tasko de ILEI sekvi tiun evoluon por progresigi la pedagogion de Esperanto konforme al siaj Statuto kaj rolo en la Strategia laborplano de UEA. La Altlernejo de Nyíregyháza (*Nyíregyházi Főiskola*) kun sia Filologia fakultato estas bona loko por diskutoj pri tiu temo.



Ĉi tiu teksto estas alvoko al ĉiuj agantoj de ILEI proponi programerojn kaj kontribui al sukceso de la konferenco. Skribu al la estrarano pri konferencoj se:

- Vi havas E-pedagogiajn kaj ILEI-organizajn demandojn por dumkonferenca traktado en Nyíregyháza;
- Vi mem pretas gvidi diskutrondon aŭ laborgrupon, aŭ prelegi pri certa temo;
- Vi povas partoprenigi al la konferenco grupon de komencantoj aŭ progresantoj por adekvata E-kurso;
- Vi interesiĝas pri E-instruista trejnado;
- Vi mem pretas instrui en E-kurso aŭ porinstruista trejnseminario;
- Vi havas alian deziron aŭ programproponon.

Viaj fruaj reagoj al ĉi tiu alvoko helpos fruan skizon kaj postan konkretigon de la konferenca programo. Anticipan dankon! Dume LKK preparas ĉion necesan por lanĉi la aliĝilon kaj mendilon de konferencaj servoj. Tion vi ricevos tra la retpaĝoj kaj aliaj komunikkanaloj de ILEI kaj per la sekvonta numero de IPR.

Bonvenon en Nyíregyháza la 30-an de julio 2016.

*Estrarano pri konferencoj, Radojica PETROVIĆ
<radojica.petrovic.rs@gmail.com>*